# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo majo 2026**

## AKTIVADO EN LA SEMAJNO DE LA LIBRO

Kiel ni anoncis en la pasinta numero, Madrida Esperanto-Liceo partoprenis en la aktivaĵoj de la internacia Tago de la Libro.

La 23-an de aprilo, je la 19-a horo, Ana Manero prezentis sian libron, "Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia", en librejo "Espacio Late", en la strato San Hermenegildo, 5. La prezentado estis inkludita en la evento LIBROMAD kunordigita de la regiona registaro.

La sekvan tagon, la 24-an vespere, ni partoprenis en la sinsekva legado de Don Quijote en la Círculo de Bellas Artes, danke al Javier kaj Ángel, kiuj legis du pecojn en Esperanto.







## KULTURA PROPONO

Por la merkredo 6-a de majo ni organizis kulturan aktivadon: ni proponas viziti kolektive la ekspozicion pri "Valle-Inclán en Madrido", kiu montriĝas dum tiuj ĉi monatoj en la Regiona Biblioteko. La ekspozicio ne enhavas informojn pri Esperanto, sed memoru ke du verkoj de tiu konata verkisto estis tradukitaj en nian lingvon, nome "Tirano Banderas" kaj "Bohemiaj lumoj". Krome, la sidejo de la Biblioteko mem estas vizitinda konstruaĵo, kiu historie estis la bierfabriko "El Águila", kaj poste estis adaptita por fariĝi la bazo de la reto de bibliotekoj en Madrido. Ni rendevuos tiun 6-an de majo, je la 11-a horo en la korto de la biblioteko, en la strato Ramírez de Prado, 3, kvartalo Arganzuela (trajn- kaj metro-stacio Delicias).

## PLIAJ RENKONTIĜOJ EN MAJO

La sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie. Ni organizas babiladojn, kaj foje teatrajn prezentadojn kaj aliajn aktivadojn.

La ekstersideja kunveno okazos la duan sabaton, nome 9-an de majo, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma al iu ajn, sendepende de la lingva nivelo kaj ke la babilado estas libera kaj sen programo.

## VIZITIS NIN

Dum semajnfino de la 18-a de aprilo, Mariko kaj Gerard, japana/germana paro el Hamburgo, vizitis Madridon. Ili gastis ĉe esperantistoj kaj vizitis la urbon kun grupo de samideanoj.

Inter la 21-a kaj 23-a de aprilo vizitis Madridon la vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Seán Ó Riain, por kontribui al konferenco pri lingvopolitiko en la Universitato Complutense. Li venis kiel estro pri plurlingveco de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Irlando, sed dum siaj paroladoj li plurfoje menciis Esperanton, aparte pri ĝiaj propedeŭtikaj ecoj.





## REMEMORIGO PRI LA SOMERAJ KONGRESOJ

Ni memorigas vin ke en tiu ĉi somero eblos ĝui tre altirajn E-renkontiĝojn en Hispanio.

La 84-a Hispana Esperanto-Kongreso okazos en Portugalete de la 14-a ĝis la 18-a de julio. Ĉiuj detaloj, kun la preskaŭ definitiva programo kaj la listo de aliĝintoj, troveblas en la adreso: https://kongreso.esperanto.es/,

Tuj poste, de la 19-a ĝis la 26-a de julio, disvolviĝos la kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) en Leono (informoj ĉe: https://sat2026leono.org/). Kaj la 82-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK) okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelona (vidu: https://ijk2026.tejo.org/).



## FORPASIS ÁGUEDA BIURRUN

Komence de aprilo forpasis de nia kara amikino Águeda Biurrun. Ŝi estis membro de MEL kaj de HEF, sekretario de HEF inter 2016 kaj 2020, kaj ŝi multe kontribuis al la organizado de diversaj agadoj, interalie la kongreson de 2018 en nia ĉefurbo.

Sed ĉefe ŝi lasas tre belajn personajn memorojn. Ni kondolencas ŝian familion kaj amikojn, kaj speciale ŝian fraton Rikardo.

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia reto *Bluesky* vi povas trovi nin ĉe: https://madridaliceo.bsky.social.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com